

& Zanahari kaj Zatovo:

< Rekante 13 el 25 battoj por strofo, entute 2425 paŝoj dum 27 minutoj. Madagaskaran fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:25> (

/LaLa dore redo TiLa SoSo LaLa; LaLa dore mimi mido TiTi rere;

(#Rekantaĵe: mimi mido TiLa SoSo doTi TiLa La; SoSo MiSo domi mildo TiSo La)

)×97)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 /Pro stelpluvo brilas vesto kaj ŝuplando; mi zigzage vagis tra l' mirinda lando,

(×; **Fablon faras ĉiam ĉiel flu' ĉiela ĉi ; Spitu tondran tremon de2 dio mem.**)

'2 kien fabloj falas rekte el la astroj, ; kie venton, fulmon estras monstraj mastroj;

'3 kie pro vulkana fajro tero varmas, ; en rivero,, lago la kajmanoj svarmas,

'4 kriĉas mil simioj, mil papagoj vete, ; mil serpentoj siblas murde mordi prete;

'5 kie dense pompas plantoj ekzotikaj, ; el grajnetoj sorĉas pastroj, la mistikaj,

'6 kie ĉiu aĵo foje estis – homo, ; nun tentanta kiel ombro aŭ fantomo,

'7 kies malbenvortojn ĉiam nokte tage ; fabelnaske sekvas plenumiĝo plage.

'8 (Mi rakontos, kion la prapatroj diris; se mensogis ili, min mensog' inspiris.)

,&2:

'9 En komenco regis – dio Zanahari... ; Foje li decidis nian teron fari;

'10 sekve ĉio preta, fakte tre perfekta, ; el la humo kreskis kurba, krispa, rekta.

'11 Ĉion vento movis kaj ne propra volo, ; ĉar radikoj ĉenis ĉion al tavolo... ..

'12 Zanahari-n distris lia verko granda ; (kiel ĉiu dio, estis li tre vanta);

'13 li rigardon sian sur la teron paŝtis, ; sunon, pluvon donis kaj nenio fastis... ..

'14 Foje li ekvidis el ĉiela lumo, ; io sin ekmovas, venas el la humo

'15 kaj – je lia miro – tute plenlibere ; ŝanĝas lokojn, pasas tien reen vere.

,&3:

'16 Jen estaĵo stranga, tian li ne vidis ; ekde kiam Teron el Ĉielo gvidis.

'17 Ĝi ja ŝajnis esti por li mensosprona, ; eĉ ridinde nova, korpe nur duona.

'18 Havis ĝi okulon kaj orelon unu, ; manon kaj piedon, sed el ĉiu unu;

'19 ĝi nur salti povis, do neniam paŝis ; tamen sin tre lerte movis, kiam pasis,

'20 skulptis el argilo bovojn, ŝafojn are ; kaj kreskigis herbojn, same proprafare,

'21 eĉ ĝi parolpove gloris sion pri tio: ; "Ne nur Zanahari, mi mem estas dio!"

'22 Ĉi duona io kun dieca povo ; estis la unua vera Hom' – Zatovo.

'23 (Al prapatra fablo vian kredon kroĉu; se mensogis ili, min vi ne riproĉu!)

,4:

'24 Jen Zatovo faris fajron sur kamparo ; peli for la kulojn de si, de bestaro... ..

'25 Fumfetero tiklis Zanahari-nazon: ; do li tuj profitis agon kaj okazon:

'26 kurieron sendis al la maliculo... ; "Kial tiu fumo?"... "Pro la aĉa kulo".

'27 "Ĉu al Zanahari ci kuraĝas spiti?" ; "Zanahari havas spacon ĝin eviti".

'28 "Kiu estas ci kaj kio cia nomo?" ; "Mi
Zatovo estas, memkreita homo!"

'29 Zanahari pune pluvon multe donis ; por
estingi fajron... En ĝi ĉio dronis,

'30 sed Zatovo restis, kreis por si monton; dum
estiĝis maro, li priridis ondon...

,&5:

'31 Kaj Zatovo boris grotojn en montflanko ;
por rifuĝi tien dum la pluv-lavango,

'32 sur montpinto faris flagran fajron, fumon, ;
kies nigro ĝenis la ĉielan lumon...

'33 Zanahari pensis: "Tamen estas strange!" ;
Kurieron sendis kaj ordonis range:

'34 "Min per cia fumo ĉesu jam inciti!" ; Sed
Zatovo mokis: "Volu ĝin eviti!

'35 Eĉ memoru, kion al ci mi deklaris: ; min el
tero mi mem kaj ne ci min faris!"

'36 Pri l' ribelo vere Zanahari miris, ; al la
kuriero post momento diris:

'37 "Al li bovidinon kun bovino prenu; la
patrinan beston – diru – li divenu!"

,&6:

'38 Tuj Zatovo ilin per disig' teruris; la bovino
muis, bovidin' alkuris.

'39 "Diru la respondon al la ruz' demanda: ;
patrinbesto ests tiu, nun bruanta".

'40 Zanahari miris, lin sagaco tentis ; kaj nun
al Zatovo li bastonon sendis:

'41 "Solvu, kie estas la komenc' kaj fino!?" ;
Ĝin Zatovo ĵetis alten por difino...

'42 Post la falo diris: "Jen montriĝis vero: ; la
komenco supre, fino al la atero".

'43 Zanahari pensis: "Kvankam tiun homon ;
ne mi kreis, tamen havas li vivkonon,

'44 sed solene ĵuras mi je la mondordo, ; certe
mia estos la plej lasta vorto".

'45 (Tiel la prapatroj la fabelon plektis; se
mensogis ili, min mensog' direktis.)

,&7:

'46 Sian solfilinon, milde belan, karan ; (oni
nur malofte vidas tiel raran),

'47 ĉerpi freŝan akvon el surmonta fonto ;
Zanahari sendis al la suba mondo...

'48 Ŝi sin klinis al la akvo... Aĥ, terure! ; Ŝi ja
vidis monstron, tuj rifuĝis kure

'49 kaj rigardis disen, sed neniun vidis, ; ĉar
Zatovo kaŝe ĉe la fonto sideis...

'50 Do ŝi iris reen, sed en fontspegulo ; nove
reaperis sama monstra ulo...

'51 Tuj el mano falis la ĉiela kruĉo, ; en ĝi
restis eĉ ne unu gut' por suĉo

'52 kaj ŝi terurite fuĝe kuris, kriĉis: ; "Ve,
survoje, Patro, ve, mi duoniĝis!"

,&8:

'53 Nun Zatovo venis el sia kaŝloko, ; ŝin
haltigis, petis per persvada voko...

'54 Rakontante multe pri soleco sia, ; pri ĵuis
naskiĝinta amo tre pasia,

'55 pri fidel' eterna ĵure li promesis, ; kaj ŝi...
nu, ŝi saĝe la bonŝancon pensis:

'56 "Ĉar en mondo estas li, la sola viro, ; kial
nur atendi, revu kun sopiro?"

'57 Ŝi konsente jesis, kise donis doton, ; kun li
loĝi iris en la montan groton.

'58 Jes, sed Zanahari furiozis beste, ;
fulmofajron ĵetis disen ĉiugeste...

'59 Nur Zatovo ĝojis, sorton kore dankis, ; ĉar
elkreskis al li membroj, kiuj mankis.

'60 (Tion la prapatroj fablis kiel veron; se
mensogis ili, diris mi malveron.)

,&9:

'61 Do Zastovo iĝis homo ne duona ; gaja kaj
kontenta kun edzino bona.

'62 Eĉ la kolerema Zanahari vidis, ; ke la juna
paro brave penis, spitis.

'63 Ilin tamen premis la – duopo sola. ; Nun
Zatovo skulptis el argilo mola

'64 homfigurojn belajn kaj figurojn bestajn ;
kaj por ili donis eĉ regalojn festajn:

'65 dolĉan maniokon, bovidaĵon grasan, ;
lakton de kokoso, frukton ananasan...

'66 Sed la figuraĵoj kuŝis nur senmove, ; same
mem Zatovo triste kaj senpove...

'67 Tiam Zanahari por si taskon prenis, ; sur
arĝenta ĉeno sur la Teron venis.

,&10:

'68 Ĉe l' argilfiguroj li Zatovon trovis: ;
 "Vivon ci al ili kiel ne alblovis?"
 '69 "Ĉar mi ne kapablas" – grumble li
 respondis. ; Nun tra zanahari dia vanto ondis...

 '70 kaj li spiron blovis al figuroj mortaj; ili tuj
 sin movis, iĝis vivoportaj,
 '71 vere vivaj homoj, nigraj, brunaj, blankaj, ;
 eĉ la bestoj same kaj diverse strangaj...
 '72 "Mi cin nun superis. Estas evidente". ;
 Miris ja Zatovo, dankis eĉ kontente:
 '73 "Cia devo estas ja bopatre agi, ; al bofilo
 cia dece doton pagi".
 '74 Zanahari sentis, ke Zatovo pravis, ; sed la
 ton' ofenda tute lin ne ravis.

,&11:

'75 Al Zatovo tuj li dorson turnis krude, ; sur
 arĝenta ĉeno supreniris mute;
 '76 en li maturiĝis di-kolero sankta ; pro l'
 Zatovo-diro, pro obstino vanta...
 '77 Tere la figuroj – nun jam vivaj – regis, ;
 sed tre stulte ili ĉion formanĝegis,
 '78 poste pro malsato havis vivon tian, ; ke
 kruele murdis unu la alian;
 '79 krome – ĉar per karno vivas, ne per pano –
 ; ekstermadis ilin ĉie la kajmano...
 '80 Sur la Tero estris murde la malsato; de
 nenie venis helpe la kompato.
 '81 Tiam turmentite do Zatovo spita ; kriis
 "Zanahari, estas mi venkita!"

,&12:

'82 Zanahari tuj per pluvo lin regaligis; dense
 rizograjnoj kun la gutoj falis...
 '83 Nun Zatovo de sur monto rokojn ĵetis, ; ilin
 en la valo digofare metis
 '84 kaj abunde sur la kampoj kreskis rizo... ;
 Tiel komenciĝis – tera paradizo.
 '85 Tamen nun Zatovo kun edzino sia ; plende
 turnis sin al Zanahari dia:
 '86 "Bone por ci super nuboj kaj nebuloj, ; sed
 tre mankas al ni bravaj posteuloj".
 '87 "Nu, tre simple estas – Zanahari diris, ; al
 filino sia mildan blovon spiris
 '88 kaj ŝi – aĥ, miraklo – sub la koro sentis, ;
 tie vivo ĝermas, kiun dio sendis.

,&13:

'89 "Sed Zatovo, pensu, vanos scisoifo; ci
 neniam scios, kiel iĝas Vivo.
 '90 Por cin mem defendi, nutri Volon, Amon, ;
 nun mi donas al ci sorĉan talismanon.
 '91 Tiam talismanon sanktaj arboj havas; serĉi,
 trovi ĝin por Homo ĉiam gravas.
 '92 Tamen mem la Vivon tiam mi reprenas, ;
 kiam plaĉas al mi, kiam ĝi troplenat.
 '93 "Diru, Zanahari, kio restos por mi? ;
 Korpojn de l' idaro mi mem penis formi!"
 '94 "Prave ci parolas... Elokventas vero... ;
 Korpojn de l' idaro gardu do en Tero!
 '95 Ci, el hum' kreskinta, havas teran trajton. ;
 Preni for Vivspiron havas nur mi rajton".
 '96 (Jen prapatra fablo... Kredu, sed ne dubu;
 se mensogo estas, ĝin al vento ŝutu,
 '97 sed memoru, fakte restas vera vero: ; la
 mortintajn idojn gardas vi en tero.)